

VENEZUELA

STELO

Organo de **VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO**
31-a Jaro = N. 73 = 1-a/2-a Semestroj 2002

ISSN 1316-0451

30 JAROJ DE VENEZUELA STELO

Nia Asocio rememoras ĉi-jare gravan daton en sia modesta sed estiminda historio. Plenumiĝas 30 jaroj de la ekapero de nia informa bulteno Venezuela Stelo, bone konita kaj ŝatata ene de la monda esperanta komunumo. La 73 numeroj publikigitaj ĝis nun, kelkfoje kun reduktita ofteco sed ĉiam seninterrompe, atestas nian konstantan aktivadon por la daŭra pluekzisto de la esperantista idealo en nia lando, kaj por la plifortigo de la movado meze de grandaj limigoj, same financaj kiel homaj.

En la unua numero de Venezuela Stelo, aperinta en julio 1973 kaj trafite direktita de Prof-o Félix García Blázquez, kiu eĉ hodiaŭ apartenas al la estraro de VEA, oni informas pri la "revivigo" de nia movado. Fakte, fine de 1972 firmiĝis la Asocio en Karakas tra la ekesto de estraro sub la prezidanteco de S-ro Manuel Certad Paredes, kaj formita per pluraj elstaraj reprezentantoj de la movado en Venezuelo, kiaj Félix García Blázquez (jam menciita), Juan E. Bachrich, Lino Moulines kaj Octavio de Diego, inter aliaj. Prof-o García estis konstanta kunlaboranto de Venezuela Stelo kaj ĝia direktoro dum multaj jaroj. Rilate al Prof-o Bachrich, li estas unuanime konsiderata kiel la "motoro" de nia Asocio, pro lia sindediĉo kaj laborkapablo. Li estis Ĝenerala Sekretario dum 30 jaroj, kaj nuntempe estas Honora Prezidanto de VEA. Elstaras ankaŭ la laborado de Prof-o Lino Moulines, kiu tenis vivanta la flamon de Esperanto en Venezuelo dum la dudek jaroj antaŭaj al la reorganizo de 1972, flanke de eminentuloj kiaj Benito Losada Azócar, fondinto de VEA en 1912, kaj Antonio Lauro, mondfama muzikkomponisto kaj gitarludisto. Preskaŭ je la komenco de tiu ĉi nova epoko de la esperantismo en Venezuelo markita per la aperigo de Venezuela Stelo, aliĝis al la movado Prof-o Jorge Mosonyi, kiu poste estis Prezidanto de la Asocio dum pluraj periodoj, Prof-o Esteban Mosonyi, konsilanto de VEA kaj kunlaboranto de Venezuela Stelo dum ĉiuj ĉi jaroj, kaj Andrés Turrisi, jam de multaj jaroj redaktoro de Vene-

zuela Stelo, konstanta membro de la Estraro kaj ĵus nomumita Prezidanto de la Asocio (2003-2005).

Multaj altvaloraj samideanoj agadis en la vicoj de nia Asocio dum la tridek jaroj pasintaj ekde 1973. Vere ni ne havas spacon por mencii ilin kaj reliefigi ĉies meritojn. Ni nur deziras substreki nian kompromison plue labori laŭ niaj eblecoj por la disvastigo de Esperanto, la formado de novaj parolantoj, kaj la realigo de kulturaj interŝanĝoj kiujn Esperanto favoras. Por tiuj celoj Venezuela Stelo donas kaj donos sendube tre valoran apogon.

Jorge Mosonyi

<p><u>VENEZUELA STELO</u> <u>VENEZUELA</u> Apartado 47675, Caracas 1041 – A http://www.esperanto-ve.org http://www.venesperanto.com-1.net esperanto-en-venezuela@yahoogroups.com</p> <p><u>REDAKCIA KOMISIONO:</u> Félix García Blázquez, Jorge Mosonyi, Nancy Aquino, Esperanza Pérez, Andrés Turrisi.</p> <p><u>ELDONANTO: FUNDAESPERANTO</u></p> <p><u>VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO</u> Apartado 47675, Caracas 1041 – A http://www.esperanto-ve.org http://www.venesperanto.com-1.net venesperanto@tutopia.com</p> <p><u>ESTRARANOJ:</u></p> <p>PREZIDANTO: Andrés Turrisi HONORA PREZIDANTO: Juan E. Bachrich VIC-PREZIDANTO: Jorge Mosonyi ĜENERALA SEKRETARIINO: Esperanza Pérez KASISTO: Juan E. Bachrich.</p> <p><u>KOMISIITOJ:</u> <u>BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO:</u> Peter Jaimez. <u>KORESPONDAJ KURSOJ, ELDONADO KAJ PROTOKOLADO,</u> <u>VENEZUELA STELO:</u> Andrés Turrisi. <u>KONSILANTOJ:</u> Félix García Blázquez, Esteban Mosonyi, Alfredo Portillo. <u>HONORAJ MEMBROJ:</u> Juan E. Bachrich, Fernando De Diego <u>ENLANDAJ DELEGITOJ:</u> Héctor Delgado T. (Mérida), Alfredo Ovalles (Maracay), Germán Montero (Maracaibo), Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar). <u>JUNULARAJ AFEROJ:</u> Yuri Yakimec</p> <p><u>ALIĜINTA ASOCIO: ZULIA ESPERANTO-ASOCIO.</u></p>	<p><u>ATENTIGO</u></p> <p>Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj.</p> <p>Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.</p> <p>Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.</p> <p>Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.</p>
---	---

NACIAJ NOVAĴOJ

Kontentige, kvin venezuelanoj partoprenis en la Universala Kongreso de Esperanto, kaj ankaŭ en la ILEI-Konferenco 2003. Kvar el ili estas membroj de

Venezuela Esperanto-Asocio. La kvina estas nealiĝinta samideano, pri kies ekzisto ni eksciis antaŭ nelonge. Li jam revenis al Venezuelo, kaj ni klopodos kontakti lin persone.

* * * * *

Harmonia kaj perfekta akordiĝo ne estas, bedaŭrinde, korolario inter esperantistoj, kaj tion ni spertis ene de la Kultura Esperanto-Fondaĵo (FUNDAESPERANTO), kiu en Venezuelo estas kiel unu el la du kruroj de la Esperanto-movado, kaj celas subteni kaj fortigi la landan Asociion.

Post stagna plurjara pluvivo, ni decidis revigligi ĝian ekziston, sed malsameco de ideoj kaj de personaj konvinkigoj kreis akran situacion, sekve de kiu la iama Prezidanto de la Fondaĵo demisiis de sia posteno.

La 27an de septembro de 2003 okazis la jara ĝenerala Asembleo, kies membroj voĉdonis por nomumi novan ESTRARON. Ĉi lasta rezultis jene:

Prezidantino: Teresa de Villasmil; Ĝenerala Sekretario: Andrés Turrisi; Kasistino: Esperanza Pérez; Voĉdonantoj: Juan E. Bachrich, Jorge Mosonyi, Esteban E. Mosonyi.

La nova Estraro jam komencis labori, kaj nun okupiĝas pri leĝaj sindevigoj de la Fondaĵo. Jam komence de la nova jaro oni oftigos la kunvenojn por adopti laborplanon kun iniciatoj realigotaj en la venontaj monatoj, kaj por desegni eblajn strategiojn por la atingo de la statutaj celoj

* * * * *

Ankaŭ Venezuela Esperanto-Asocio renovigis sian Estraron. La 8-an de novembro 2003, okaze de la jara ĝenerala Asembleo, la venezuela esperantistaro voĉdonis por nomumi novan Estraron kiu funkcios dum la venontaj du jaroj. Vere, “nova Estraro” estas eŭfemismo, ĉar praktike konsistigas ĝin la samaj membroj, kvankam kun malsamaj postenoj. Tio estus kontentiga solvo, se la estraranojn konfirmus pro iliaj meritoj aŭ/kaj kapabloj amasa membraro. Sed pli modeste ni devas agnoski, ke la simpla rotacio de roloj estas nur rimedo pro la neeblo elekti inter pluraj kandidatoj kaj el limigita membraro. Kiel ajn, la ĵus nomumitaj estraranoj (Prezidanto: Andrés Turrisi; Vic-Prezidanto: Jorge Mosony; Ĝenerala Sekretariino: Esperanza Pérez; Kasisto: Luan E. Bachrich; Voĉdonantoj: Esteban Mosonyi, Félix García Blázquez, Víctor Sirvent) pretas fari sian eblon por elirigi la Asociion el stagna situacio kiu devenas grandparte el la pluraspekta krizo kiu karakterizas la nuntempan Venezuelon kaj kiu malebligas sukcesajn iniciatojn kaj eĉ la kutimajn agadojn. Nia Asocio klopodos pluvivi kaj almenaŭ reteni la nunajn fortojn, sed intencas kaj planas reveni al vigla laboro kiam la situacio montriĝos pli taŭga kaj ŝancohava.

* * * * *

Venezuela Esperanto-Asocio daŭre kunlaboras kun la Lernejo de Homeopatia Medicino de Venezuelo, kaj prizorgas esperanto-tradukojn de resumoj de artikoloj por la Gazeto Homeopatia de Karakas, kiu aperas dufoje jare kaj atingas la tutan mondon.

INTERNACIAJ NOVAĴOJ

Atilio Orellana informas ke la Oficejo de la UEA-Komisiono por Ameriko havas novan telefonan numeron: +55 61 563 9812 kaj ĝi estas atingebla pere de

la jena retadreso: amerikaoficejo@yahoo.com.br

Ĝi nuntempe funkcias en la sidejo de Taguatinga Esperanto-Klubo, en la urbo Taguatinga (Brazilo) kaj en ĝi deĵoras 2 personoj: Sonia Maria ALVES LUCIO kaj Wanderson MENDES MACHADO.

* * * * *

La Amerika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio (UEA) lanĉas la projekton "NESTO".

La baza celo de tiu projekto estas krei lokajn kaj regionajn nukleojn de Esperanto-movado en ĉiuj eblaj lokoj tra Amerika Kontinento. Por elektronika longdistanca lernado, oni uzas la kurson de Esperanto, disvolvita de Carlos Pereira, kiu estas disponebla senpage en la jena retadreso: <http://www.cursodeesperanto.com.br>

La lernantoj, kiuj kandidatiĝas por lerni Esperanto per tiu metodo, povas enskribiĝi ĉi tie por ricevi virtualan instruiston. Ankaŭ la instruistoj povas enskribiĝi ĉi tie. La amerika oficejo de UEA (ĉe Braziljo, Brazilo) centrigos ĉiujn petojn kaj paros la registritajn lernantoj al volontulaj virtualaj instruistoj (ĉio senpaga). La instruistoj loĝas en la urbo/regiono de siaj lernantoj. Kroma aktiveco de la instruisto estas socialigi kun siaj lernantoj, por informi pri la esperanto-movado laŭ la principaro de "Manifesto de Prago" kiu prezentas, en moderna stilo, la celojn de esperantismo tra la nuna mondo.

Do, oni volas entrepreni movadon kiu ebligas la kreskadon de esperantistaro en ĉiuj komunumoj de Ameriko. Aliflanke, la reta interagado inter esperantistoj kreskis multon lasttempe. Sekve, tio faciligas porti ĝuste el la reto multajn estontajn esperantistojn. Tio estas tre utila ekspansia politiko, ĉar la retularo estas konata populacio de junuloj kun granda inteligenteca potencialo.

Projekto NESTO simbole volas kreskigi siajn "virtualajn" idojn kaj porti ilin al esperantista etoso en sia loĝloko. Tiel oni helpas la formigojn de kluboj kaj asocioj de esperantistoj, daŭrigante la esperantistan movadon en la plej diversaj regionoj de nia kontinento. Ni celas ke la sukceso de tiu projekto en Ameriko transiru al la tuta mondo.

Enskribiĝu tuj por esti instruisto aŭ lernanto de Esperanto, akorde al la filozofio de projekto NESTO. Tiel, vi kontribuas por ke ni havu pli justan lingvan mondon.

Uzu tiun retligilon por anoci tiun projekton:

<http://www.esperanto.org.br/mov/ameriko/nesto.htm>

Post enskribiĝo, Amerika Oficejo de UEA baldaŭ kontaktos vin.

* * * * *

Ankaŭ ĉijare efektivigis la ĉefeveno de la monda esperantistaro. De la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto, la urbo Gotenburgo (Svedio) gastigis la 88-an "Universala Kongreso de Esperanto". La kongreso okazis en la konferencejo Svenska Mässan (Sveda Foiro)

* * * * *

De la 2-a ĝis la 7-a de aŭgusto 2003 okazis en Örestrand (Svedio) la 36-a Konferenco de ILEI. Precipa ero de la Konferenco estis trejnseminario celanta 10 ontajn grupgvidantojn kaj helpantojn en la projekto Interkulturo.

RECENZO (1-a)

MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ – Esperanto. Curso del idioma internacional. Zaragoza.1995.118 p.

Kurso de Esperanto por hispanlingvanoj, konsistanta el 18 lecionoj, preparitaj por kurso de 40 horoj, kun gramatikaj klarigoj, ekzercoj, provizita per dudirekta vortareto esperanto-hispana kaj hispana-esperanto en la apendico.

La aŭtoro mem rekonas ke la kurso ne estas kompleta, ĉar li flankenlasis la malfacilajn punktojn. Rilate al la uzo de la participoj, li klarigas tion per la strikta vidpunkto de la fundamenta gramatiko.

Oni povas rimarki la didaktikan klarigon de la afiksoj laŭ ties funkcioj, eĉ pli alirebla ol tiu de la Akademio.

Gutiérrez instruas ke la finaĵo “-e” aplikiĝas por la derivitaj adverboj, tio estas vero kaj ankaŭ oni povus diri ke la finaĵon “-o” oni aplikas al komunaj substantivoj.

Trafa klarigo pri la prononcado de la diversaj fonemoj de Esperanto kompare kun tiuj de la naciaj lingvoj. La desegnaĵoj estas allogaj kaj komplementas la klarigojn de la lecionoj.

Resume, lernolibro tre konvena por la aktuala instruado de Esperanto.

RECENZO (2-a)

Christiane De Vleminck kaj Emile Van Damme. **ABC- Gramatiko de Esperanto.**

La celo de ĉi tiu verko estas – laŭ la antaŭparolo – “respondi la plej gravajn demandojn...” de la praktikantoj de la lingvo. Por tio, la teksto estas strukturita en kolumnoj kaj kadroj kun abundaj ekzemploj. La ordigo de la temoj estas laŭalfabeta.

La sinteno de la geaŭtoroj ne estas partieca, ĉar la polemikaj punktoj prezentiĝas en ambaŭ vidpunktoj, sen kaŝi ilian preferon.

La terminaro estas tiu de la eŭropaj lingvoj. Notinda estas la uzado de la termino “cirkonstanca komplemento” pri kiu en aliaj lernolibroj oni uzas alian kiu estas malmulte internacia.

En la vortfarado oni avertas kontraŭ dubindaj kunmetoj, kiel sekvo al principo de klareco. Laŭ la sama principo estas instruata ke la prefikso “ek-” signas la komencon aspekton, ĉar nuntempe la momenta aspekto estas tre malofta kun tiu prefikso.

En la ekspono de la diverĝeco inter atistoj kaj itistoj aperas iu korekto ne tute ekzakta, ĉar en la ekzemplo “oni transportis lin en hospitalon en kiu li estis operaciata” preferindas *operaciota*, ĉar la operacio okazis post la alveno al la hospitalo, ne samtempe. Do, ambaŭ skoloj malpravas.

Estas tre ŝokanta la aserto ke “La predikativaj adjektivoj kaj participoj havas la adverban --e formon...”; en unu sola eldiraĵo troviĝas du malobeoj al la fundamenta gramatiko, nome: la tria kaj la sepa reguloj.

Rilate al neuzo de iuj prepozicioj antaŭ infinitivo, vere la Fundamento nenion diras, kaj nenial la lingvuzo estas deviga, se oni priententas la Bulonjan Deklaracion.

Resume, la verko, malgraŭ siaj manketoj estas tre adekvata por konsultantoj, kaj espereblas plibonigoj en estontaj reeldonoj.

PROPEDEŬTIKECO DE ESPERANTO ĈE LA VORTFARADO

Se en la instruado de Esperanto oni tute relegacias la gramatikan nomenklaturon ĝenerale uzatan en la diversaj naciaj lingvoj, tio evidente damaĝas la internaciecon de Esperanto kaj konsekvence malhelpas ties propagandatan propedeŭtikecon.

Jam estas konita la decido de la Venezuela Sekcio de ILEI rilate al la neinternacieca nomenklaturado uzata en PAGE kaj iamaniere agnoskita – t.e. uzita kaj uzata en oficialaj dokumentoj - de la Akademio.

Nun ni vidos iujn detalojn de la akademia teorio de la vortfarado aperinta en oficiala dokumento, kiu suferas pro la menciita peko kaj aliaj.

“Substantiva ĉefelemento... substantivigas la ia-ajn-kategorian flankelementon... Ekz-e:

homkoro = homo-koro = koro de homo” (1) Temas pri la nomita “rekta vortefiko”. Jen la objetoj:

1. Tiu regulo ne ekzistas en naturaj lingvoj, almenaŭ en angla, franca, hispana, itala kaj portugala. Do, ĝi ne estas internacia.
2. Oni montras la ekzemplon “homo-koro” por indiki la efektivigon de la regulo. Tamen ekzistas kontraŭdiro kun tio kion oni asertas en la sama konstato kie oni deklaras ke la streketo indikas kunorditan kunmeton. Alivorte, “homo-koro” signifus homo kiu samtempe estas koro!
3. Alia diferenca ekspliko povus esti ke la ĉefelemento adjektivigas la flankelementon, ĉar homkoro = homa koro.

Aliaj nekongruaĵoj, en la sama dokumento: kiam oni parolas pri la inversa vortefiko.

“Verba prefikso kiel maldekstra elemento efikas verbige: reformo = re-formi-o; ekmartelo = ek-marteli-o” (2)

Ĉu ne estas pli simpla instrui ke la prefikso “re-“ estas aplikenda al verbaj ideoj?”, ĉar ne havas sencojn ekzemple: ektablo, replumo, ktp.

Aliaj nekongruaĵoj estas troveblaj laŭlonge de la sama dokumento, kiuj ĉi tie ne estas menciataj pro manko de spaco.

Félix García Blázquez

BIBLIOGRAFIAJ NOTOJ

- 1) Aktoj de la Akademio 1963-1967 p. 65.
- 2) op. Cit. P. 67

AL ILEI

Ni komunikas al vi ke la Venezuela Sekcio de ILEI decidis ke en elementaj kursoj oni ne instruos malfacilajn temojn, ĉar tio povus prezenti la internacian lingvon ne tiel facilan kiel ĝi aspektas laŭ la kutima propagando.

1 – Unu el tiuj malfacilaj temoj estas la predikativa finaĵo, aperinta en la paĝo 232 de la lasta eldono de PAGE.

2 – En daŭrigaj kursoj, ni planas instrui tiun uzmanieron, nur por ke la lernantoj povu interpreti la klasikajn verkistojn, sed avertante ke ghi ne estas deviga.

La motivo de nia pozicio estas ke la Lingva Konsultejo de la Akademio informis nin ke ne ekzistas rezolucio aprobinta la menciitan regulon. Malgraŭ ke laŭ opinio de iu akademiano estas deviga imiti la ekzemplojn de la Ekzercaro, tiu argumento ne konvinkis nin, ĉar Zamenhof mem ne sekvis la modelojn de tiu parto de la Fundamento, kaj pro tio, ni ne trovas motivon por instrui tiun regulon. Ĉi sube ni pravigas per ekzemploj nian pensmanieron. Efektive:

En la paragrafo 19 de la Ekzercaro legiĝas :
“Estus tre bele ke mi iru al la fonto...”

tamen zamenhofa ekzemplo laŭ PAGE:

“Estus tre utila tute precizigi kaj klarigi la rolon de la Oficejo ...”

Do, estas humane neebla postuli kompletan fidelecon al la Ekzercaro, post tiu ekzemplo de la aŭtoro de la lingvo.

Bonvolu kompreni ke ni nenial deziras ofendi la memoron de Zamenhof, kiu asertis ke “...malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li ne permesis al si (almenau *konscie*) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj” (*). La citita ekzemplo, laŭ nia opinio ne signifas ke Zamenhof deviis de la Fundamento, sed nur ke la modeloj de la Ekzercaro ne estas nepre postulendaj. Aliflanke, lia stilo estas neniel deviga, se ni priatentas la Deklaracion pri Esperantismo de la Unua Universala Kongreso de Esperanto.

Kuŝas en niaj manoj la korespondaĵo kun la Lingva Konsultejo de la Akademio.

ILEI-Sekcio de Venezuela Esperanto-Asocio

(*) Prenita de la Antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto

HEPATAĴOJ DE KOKIDO KUN DRAKUNKOLO

Se ĝi estas varma, ĝi estas supo.

Se ĝi estas malvarma, ĝi estas biero⁽¹⁾

---Kelnero --- diris Don Juliano, per voĉo de spertulo --- mi kredas ke al tio ĉi (li koincidigis la direkton de sia rigardo kun tiu de la montrofigro de sia dekstra mano, indikante la teleron kiun li havis antaŭ si) mankas pinĉajeto da drakunkolo. Mi ne volas troigi, ne maltrankviliĝu. Sed ke ĝi mankas, ne dubebblas.

Manuelo (Manolo), kiu estis la citita kelnero, ne sciis kio estas drakunkolo, tamen posedis la avantaĝon ke li ankaŭ ne scias kion signifas maltrankviliĝi. Sin kaŝante en la duonobskuro de la luksa lokalo, kaj kun sia imagopovo de Galego, per voĉo firma, sed bonedukita, diris:

---Povas esti --- li observis dum kelkaj instantoj iun termometron pendantan sur la muro, kaj kies utileco verŝajne konsistis el tio, ke eblis pendigi ĝin---. Tamen, povus okazi certa influo de la loka temperaturo kaj/aŭ (*tion lernigis al li iu ĉilano kiu preparadis la farĉon de la pasteĉoj*) de la reganta humido. Temas pri aferoj tre delikataj, vi scias, --- li faris mallongan paŭzon --- mi supozas.

--- Komprenoble! Kiel mi ne pensis pri tio? ---li tusetis, kovrante sian buŝon per la buŝtuko --- Kiel vi nomiĝas, junulo?

--- Manuelo, sinjoro.

--- Manuelo kion?

--- Lungares, sinjoro.

--- Manuelo Lungares! ---li deprenis siajn okulvitrojn --- Nomo de kuiristo!
--- Li atentrigardadis lin dum unu momento --- Vi estas juna; vi havas estontecon... bone... kion vi rekomendus al mi por kompensi, por tion diri ĉi tiel, ĉi tujan malhavon de drakunkolo? Aŭ, por min esprimi alimaniere, ĉi neatenditan mankon de tiu deziregata spicaĵo?

Manuelo faldis la servotukon kaj ĝin korekte lokis sur sian maldekstran antaŭbrakon. Li klinis mediteme la kapon kaj pripensadis (almenaŭ, tio ŝajnis) dum kvin sekundoj.

--- Pirojn "Bela Helena", sinjoro... mi kredas ke jam ne restas plia rimedo --- li atendis ian reagon --- ... eble akompanatajn de iu fromaĝeto...

---Kamemberto! --- ekkriis, kontentega, Don Juliano.

--- Ekzakte --- diris Manuelo, planante trompegali lin per peco de blanka fromaĝo (Pasteŭrizita) kiu estis fariĝinta tute flava --- kaj foriris.

--- Simpatia, la junulo --- komentis Don Juliano --- kaj li konas sian oficon. Oni tuj rimarkas ke li scias pri kuirarto. Li iros malproksimen. Mi estas certa.

Ni estis forgesinta diri, submetitaj pro la personeco de Don Juliano, ke ĉi lasta havis kunmanĝanton, Don Vincenton, kiu respondis lante:

--- Tio dependas. En ĉi mondo ĉio estas relativa. Oni ne devas trapidi.

⁽¹⁾ Rimarko prenita el la unua, ununura kaj lasta paĝo de la Enciklopedio de la Brita Kuirarto, Eldono MMMCCC, Cambrige, England. Pliigita kaj reviziita, kompreneble.

--- Vi, ĉiam kun viaj frazoj! Kion diable vi intencas nun diri?

--- Mi kredas, ke mi estis sufiĉe klara. Mi diris: en ĉi mondo ĉio estas relativa. Tion ĉi scias ĉiuj. Sed... eble vi pravas: mi devis esti iom pli eksplicita. Mi intencas diri, ke ankaŭ tio kion mi diris estas relativa. Aŭ ĝi povas esti tia. Kio ankaŭ estas relativa.

--- Sed, ĉu vi ne povas paroli alimaniere? Mi komprenas nenion. Laŭ maniero absoluta kaj relativa.

--- Bone, mi ĝin klarigos. --- li servis al si unu plian glason de Chateau Pom Pom 1976 --- Delica! Nu bone, mi volas ke vi promesu ion al mi.

--- Promesi? Kion?

--- Ke vi ne ofendiĝos.

--- Mi? Ofendiĝi? Sed, pri kio vi parolas?

Manuel alvenis kun la piroj "Bela Helena", taŭĝe akompanataj de iliaj pecetoj de fromaĝo Kamemberto.

--- Jen, sinjoroj...Ĉu mi povus sugesti iun "kafo-puŝilon"?... Cointreau?... Rumon trioble filtritan?... Marakita?... aŭ eble Sambuka?- li rigardis al Don Juliano, kiu estis dubanta --- kun la koncernaj kafgrajnoj, kompreneble.

--- Ĝuste tio! --- kriis Don Juliano --- Kaj sin turnante al Don Vincento --- Ĉu mi ne diris al vi? Tiu ĉi knabo havas estontecon. Antaŭen, kelnero!

Manuelo foriris, kontenta. Ĉar temis pri lia unua tago en la lokalo, kaj en la ofico, li ne povis plendi, la afero rezultis kontentiga. Kaj al tio oni devus aldoni, ke unuafoje en sia vivo li estis faranta ion.

Sendube, pensis Manuelo, tiu sinjoro devas pravi: mi havas nekredoblan estontecon. Kaj rilate la aferon de la drakunkolo, siatempe mi lernos ĝin. Estas tempo por ĉio.

--- Revenu ni al nia temo --- la voĉo de Don Vincento estis firma. Laŭŝajne, oni estis tuŝanta lin en la plej profunda punkto de lia orgojlo.

--- Ĉi tiuj piroj estas ege bongustaj. Kaj pri la Kamembert, eĉ ne parolu!--- Don Juliano spiris profunde--- Se mi pensas ke oni ne plu importos ĝin! Ĉar ne estas eĉ imagebla ke oni produktos ĝin ĉi tie; kaj ne estas mia intenco paroli malfavore pri nia lando. Dio liberigu min de tia intenco! Ĝi signifus kvazaŭ starigi fabrikon de arepoj² el senŝeligita maizo (ne tiu komercata en saketoj) en Edimburgo. Ĉu vi komprenas min? --- li kontemplis la rigardon fridan kaj senespriman de Don Vincento --- ...pardonu min, sed fine kion vi estis dironta?

--- Vi reklamaciis al tiu ulo, aŭ kelnero, por nomumi lin iamaniere, ke al la kokidaj hepatoj (la nuro kiun mi certe manĝis) mankis, mi rememoras viajn ekzaktajn vortojn: "pinĉaĵeto da drakunkolo".

--- Kompreneble! Kaj mi aldonis, se la intenco estas interbatali per citaĵoj, ke "mi ne volas troigi, ne maltrankviliĝu. Sed ke ĝi mankas, ne dubblas". Mian palaton, Don Vincento, neniu kaj nenio trompas --- Li laŭtigis sian voĉon --- Okey?

--- Trankviliĝu, mi petas... Kaj mi rememoras ke li respondis al vi ke tre verŝajne tion oni povus ŝuldi al la loka temperaturo kaj/aŭ al la reganta humido. "Temas pri aferoj tre delikataj, vi scias, --- li diris, kaj post mallonga paŭzo li aldonis: "mi supozas".

² Arepo: tipa venezuela, ronda farunaĵo el blanka aŭ flava maizo.

--- Certel! Precize en tiu momento mi rimarkis liajn ecojn, liajn kondiĉojn; denaskajn, se oni prijuĝas laŭ lia juneco. Li estos, sen ia dubo, granda kuiristo. Supera kuiristo, mi dirus --- li denove tuis, utiligante la saman buŝtukon kiun li estis uzinta por la hepatoj kun drakunkolo, la piroj “Bela Helena”, la “Kamemberto”, la Sambuka (kun ĝiaj kafgrajnoj) kaj la unuan tuselspiron.

--- Mi iras al la kerno de la afero. Kaj, denove, mi petegas vin ne ofendiĝi.

--- Kaj denove: ofendiĝi pri kio?

La voĉo de Don Vincenzo tuje fariĝis frida kaj nepersona: ŝajne, jam temis pri ia lukto de cerboj. Aŭ de “*gourmets*”.³ Ĉio estas relativa. Don Vincenzo sin montris akra:

--- Tiuj hepatoj ne enhavis drakunkolon.

--- Kion ? --- Kune kun la impreso li elbuŝigis unu kafgrajnon, kiu finatingis la jam konatan buŝtukon.

--- Kion vi aŭdis. Kaj pardonu la krudecon ; pro tio mi petegas vin, en du okazoj, ne ofendiĝi. Pro la sama kialo mi rimarkigis al vi, antaŭe, ke en tiu ĉi mondo ĉio estas relativa...

--- Kion vi estas diranta? --- li metis fronte al li la buŝtukon, ĉiokaze por purigi siajn okulvitrojn, ---ofendiĝi? Relativa? La vero estas, ke nun vere mi ne komprenas vin.

--- Ne maltrankviliĝu. Mi estos konciza. Vi montris supinan nescion kiam vi diris, mi ripetas, ke al la kokidaj hepatoj mankis “pinĉafeto da drakunkolo”.

--- Jes. Kaj mi aldonis ke...

--- Ne aldonu ion kaj silentu. Krome la junulo, aŭ tiu aĵo, vera geniulo, laŭ vi, diris ke, kaj denove mi ripetas, ĝi povus esti ; sed ke estis ebla ke estus efikintaj lokaj kondiĉoj kiaj la temperaturo k/aŭ (mi neniam forgesos tion) la reganta humido.

--- Kaj ?---

--- Vi ĵus uzis la plej mallongan vorton kiun uzas la pedantoj kaj/aŭ malkleruloj kiam ili jam havas nenion por diri. Sed ne gravas. Mi resumas kaj konkludas : mi ĵus spektis la plej hontan spektaklon kiun povus spekti homestajo: tiun de du malkleruloj sin trompante reciproke.

La kafgrajnoj jam troviĝis disjetitaj tra la tuta tablo. Don Juliano kolerkriis:

--- Mi ne permesas al vi!

--- Mi atendis kaj timis tiaspecan reagon. Plurfoje mi diris kaj rediris al vi, mi ripetas, ke vi ne ofendiĝu. Ĝuu vian neŭrozon. Sed, ni estu objektivaj; meditu ni, kaj kondu tu ni kiel du civilizitaj personoj kiuj ni finfine estas. Por konkludi tiun ĉi pridisputon, kiu ne estas tia ĉar mi pravas, voku ni la kuiriston, por ke li konfirmu kion mi estas asertanta.

--- Ni voku lin! --- tondris Don Juliano.

La homoj, koleriĝante, fariĝas ridinda kaj parolas tiamaniere. Kaj foje, eĉ ne koleriĝante, ankaŭ. Temas pri gradoj de ridindeco aŭ de koleriĝemo: ĉio estas relativa.


La kuiristo alvenis senprokraste; li venis kun mieno afliktiĝinta, ne kun vizaĝo de kuiristo (vi komprenas min). La ĉapo sub la brako, samkiel kiam oni degradas iun oficiron de la terarmeo.

³ Gourmet: franca voĉo signifanta “gastronomo”.

--- Sinjoroj! --- Li preskaŭ genuiĝis, sed ne komplete, ĉar li estis kuiristo, - -- Vi devas pardoni min! Okazas ke Manolo, ĉi stultulo (li profitis la epiteton por frapi lin per la ĉapo) frenezigas min. Pardonu min, sinjoroj. Pro la rapidigo de Manolo, kiu scias absolute nenion... ne, Bonvolu! Mi jam scias kion vi diros al mi - li manĉaptis la buŝtukon de Don Juliano kaj sekigis al si la ŝviton el la frunto, la nazo kaj la maldekstra kubuto --- pro tiu rapidigo, mi metis la saŭcon kun la drakunkolo (kreaĵo mia, kompreneble) en la telerojn (antaŭe hejtitajn, kiel devige) kaj kiam mi estis surmetonta al ĝi la hepataĵojn de kokido (antaŭtempe poĉitajn, kompreneble, kun butero Bercy laŭ Marsejla stilo, kio estas nun lastmoda) rezultas ke tiu ĉi simplulo (dua ĉapofrapo) ilin estis jam forportinta. Imagu, svenu! Vi ĵus manĝis du telerojn da saŭco kun drakunkolo sen hepataĵoj de kokido! Pardonu, pardonu!

Kelkajn instantojn post la fino de la tumulto kiu estiĝis, kaj dum kiu sin frapadis alterne kaj samtempe Don Juliano kaj Don Vincenzo en iu flanko kaj la kuiristo kaj Manolo en la alia, iu filozofo kiu estis trinkanta unu "Cuba libre" ĉe la vendotablo komentis, tre trafe:

--- Okazas ke en ĉi mondo ĉio estas relativa.



ABONILO

(Eltondu aŭ kopiu ĝin)

Nomo (persono aŭ asocio aŭ gazeto):

Adreso: -----

(1) Mi deziras aboni Venezuelan Stelon por la jaro _____ kaj sendas:

a) 15 i.r.k.; b) Filatelajn poŝtmarkojn / _____ /; c) libron kun titolo

(2) Mi deziras ricevi (surface) Venezuelan Stelon interŝanĝe de la gazeto: _____ aperanta _____foje jare.

Dato _____ SUBSKRIBO _____

Sendu al: VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO, Apdo. 47675,

CARACAS 1041-A = VENEZUELA

<esperanto-en-venezuela@yahoogroups.com>

<venesperanto@tutopia.com

Akiri amikon estas Bonŝanco:
Havi amikon estas Donaco.
Konservi amikon estas Virto.
Esti via amiko estas Honoro.

Kun tiuj ĉi konsideroj,

Ĝuu pli gaje ĉi Kristnaskon,
Kaj travivu sub pli brila lumo
la venontan Jaron 2004!

Ĝojon, Pacon kaj Kunlaboron deziras al vi
Venezuela Esperanto-Asocio
